

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://satesperanto.free.fr/> *** retadreso: satesperanto@free.fr

ZAGREB

URBO
DE
KULTURO
KAJ
ARTO



Julio-Agusto 2005 76-a jaro, n-ro 7-8 (1201-2)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €



"FLORAART"
foto: M. Belošević

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...

Karaj,
kiam vi ricevos tiun
ĉi numeron de Sen-
naciulo, nia kon-
greso en Zagrebo
jam okazos. Ĝi es-
tos tre malgranda
sed same plenraj-
ta kiel ĉiuj antaŭaj.



Mi vere bedaŭras ke vi tiel malmulte
interesiĝas pri nia Asocio kaj pri ĝia
estonto. Kelkaj kialoj de nepartopreno
estas, ke jam multaj E-kongresoj oka-
zis en Zagrebo. Sed, neniam ĝis nun
SATkongresis en tiu ĉi urbo. Krome,
kiam oni interesiĝas pri la sorto de
nia asocio, ne gravas la loko kie ni
kongresos. Gravus ke ni pridiskutu la
aktivecon de la asocio, analizu ĝin kaj
preparu la estonton. Dum la kongreso
ni povas rekte, persone alporti ion al
SAT, ĉar SAT estas ĝiaj membroj. Ni
esperu ke la venontjara kongreso estos
pli nombra kaj ke ĉi-jare estas nura
escepto.

Agrablan someron al ĉiuj,

via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj
redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020
Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo:
+33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.

TTT-paĝoj: <http://satesperanto.free.fr>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30;
de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster
la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020
39

BIC: PSSTFRPPPAR

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G.
Rollin kaj K. Barković.

Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barković

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la
redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la
aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni
ne resendas. La limdato de ricevo de manus-
kriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

□

Imprimé par: EDRB, Avenue Mozart, FR-
75016 Paris.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques
BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France
55 €.

Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de
nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

N° CPPAP 0510 G 86567

Limdato por ricevo de kontribuajtoj estas
ĉiam la 10-a en la monato.

NIA KONGRESLANDO

por tiuj kiuj ne povos veni al nia kongreso !



Laŭ la diroj de loĝantoj de nia kongreslando, jen la plej bela lando de la
mondo. Ĉu vi eble ne konsentas kun ili? Efektive, ili iom troigas. La vero
estas, ke ekzistas du plej belaj landoj en la mondo.

Nc 'XKC''hc'l'ltk 'M'QCVKQO'

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la
reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple
(Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn teks-
tojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi
la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu
ilin normale. Dankon.

La Redakcio



Amnestio  internacia

Haltigi perforton kontraŭ virinoj

Amnestio Internacia, en sia kampanjo kontraŭ perforto al virinoj, petas ke oni subtenu ĝian agadon ĉe la registaroj kaj internaciaj instancoj, t.e :

- **Kontraŭi la diskriminaciojn kaj perfortojn kontraŭ la virinoj :**
 - Subskribi ĉiujn internaciajn kaj regionajn kontraktojn rilatantajn la virinajn rajtojn,
 - Konformigi la naciajn leĝojn kun tiuj kontraktoj,
 - Apliki tiujn leĝojn kaj provizi la rimedojn por tio,
 - Adopti internacian kontrakton, kontraŭ armilkomerco.
- **Protekti la virinojn okaze de militkonfliktoj kaj post la konfliktoj :**
 - Lukti kontraŭ seksperforto, uzita kiel militarmilo,
 - Starigi programon por protekti kaj helpi la viktimojn,
 - Persekuti kaj puni la kulpulojn de tiaj agoj.
- **Lukti kontraŭ perfortoj meze de la familio :**
 - Agnoski ke la perfortoj engaĝas la respondecon de la ŝtato,
 - Starigi programon por protektado kaj helpo al viktimoj,
 - Persekuti kaj puni la kulpulojn de tiaj agoj.
- **Protekti la defendantojn de la virinaj rajtoj, endanĝerigitaj pro ilia agado :**
 - Promocii la « Deklaro de la Unuiĝintaj Nacioj pri la defendantoj de la Homaj Rajtoj »,
 - Starigi programon por protektadi kaj helpi la defendantojn,
 - Persekuti kaj puni la kulpulojn de tiaj agoj.

Eblas agadi ĉe la filio de Amnestio Internacia en via lando.

PROLETOJ DE ĈIUJ LANDOJ KONKURENCIĜU !

Tio povus esti la devizo proponata de la nuna tutmondiĝo. La monda organizo de la komerco celas ke nenio povu ĝeni la konkurencon inter la varoj unue sed ankaŭ rilate la laborfortojn.

Ĉiamaniere en la valoro de varo estas ĉefe la kosto de la homa laboro. Ekzistas ankaŭ la pli rekta puŝo al la konkurenco inter laboristoj. Ekzistas tre grandaj diferencoj inter la mezaj salajroj laŭ la landoj. Laŭ la superliberalisma ekonomio, trovos laboron tiuj kiuj estas malpli postulemaj rilate salajrojn, laborkondiĉojn, sekurecon en laboro, ktp. Ĉu oni ne vidas ke, anstataŭ unuigi la popolojn, tio povas krei la malamikecon inter la laboristoj?

Kiu profitas de tiu globismo? Estas evidente, la monpotenculoj kiuj regas la merkaton, kaj fakte la homojn.

La motivo de la investoj ne estas la bono de la homoj, sed la serĉo de la maksimuma profito.

La konstitucio proponita al la civitanoj de la Eŭropa Komunumo, tute baziĝas sur tiu superliberalismo. Longe ĝi priskribas regulojn por ke la konkurenco ne estu falsita kaj ĝenata per iu ajn regulo. En la teksto oni trovas 178 fojojn la vorton konkurenco, 88 fojojn la vorton merkato. Oni penas trovi vortojn kiel solidareco, kunhelpo ktp., krom eble en la militaraj punktoj. Nur konkurenco gravas.

Tiu konstitucio havas strangan aspekton. Ĝenerale la konstitucioj de landoj aŭ unioj ne parolas pri ekonomio. Tiu de Sovetio estis escepto.

Estas strange ke la Socialistaj partioj de pluraj landoj subtenas tiun tekston kiu definitive fermas la pordon al ĉiuj formoj de socialismo, kaj aliaj ekonomiaj formoj kiel Distribuata ekonomio, kaj al ĉiuj eblecoj kontroli aŭ taksii kapitalmovojn laŭ la sistemo ATAK.

M. Hardy